# *Arce akuzas la faktan re?imon saboti la elektan procezon*




La Paz, okt 7 (RHK) La prezidenta kandidato de la Movado al Socialismo, (MAS) en Bolivio, Luis Arce, denuncis ke la fakto-re?imo realigas sabotajn planojn kontra? la elekta procezo kaj minacas per la milita forto.

La ?usaj deklaroj de la registaro evidentigas ke ili ne rezignas je la intenco meti obstaklojn al la elekta procezo kaj klopodas estigi timon kaj minaci per la forto de la militistoj, skribis Arce en letero sendita al la internacia komunumo diskonigita en la sociaj retejoj, la? sciigas la televida ?eno HispanTV.

La letero sendita al la ?enerala sekretario de UN, Antonio Guterres; al la prezidanto portempa de la Komunumo de Latinamerikaj ?tatoj (Celac), la meksika prezidento Andrés Manuel López Obrador; al al reprezentanto de la E?ropa Unio por eksteraj aferoj, Josefp Borrell, kaj al la p rezidanto de la konstanta konsilantaro de la organizo de amerikaj ?tatoj, Luis Cordero.

La letero de Arce estis diskonigita post la minacoj de Jeanine Añez, pri uzo de forto kontra? eventualaj protestoj anta? kaj post la elektoj.

Hodia? mem, la Supera Elekta Tribunalo (TSE) de Bolivio, petis per komuniko, "scenejon liberan je perforto", post novaj epizodoj de agresoj denuncitaj de kelkaj kandidatoj, kiuj partoprenos la elektojn la venontan 18-an de oktobro.
Arce, kiu gvidas la enketojn kaj evidenti?as kiel ebla gajnanto de la elektoj en unua rondo, asertis ke la movado MAS estas kompromitita kun la elektoj, la socia paco kaj la respekto al la rezultoj de la venontaj elektoj.

La socialista gvidanto avertas ke la registaro de Añez aplikas malstabiligajn planojn por fiaskigi la elektan procezon.
Arce konsideris ke la ?eesto de la internacia komunumo en la elekta procezo "estas pli grava ol neniam ajn" kiel "faktoro trankviliga de la civitanaro, persvada faktoro fronte al tiuj, kiuj provu subfosi la demokratian ekzercon kaj estas garantio de respekto al la elektaj rezultoj".

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/236125-arce-akuzas-la-faktan-regimon-saboti-la-elektan-procezon

**Radio Habana Cuba**